

N. N. 02,
Soldatokanto

tradukita de Hans-Georg Kaiser

1. Turniĝi kien mi povus
en tiu trista temp' ?
En ĉiu loko sin trovus
milit' kaj malkontent'.
La rekrutiga band',
nin ĉasas en la land'.
Soldato ĉiu fariĝu:
servisto kiel vagant'.

2. En nokto ili alvenis
kun ruz' al mia lit'.
La leŭtenant' min ekprenis,
ne eblis plu evit'.
"Ekstaru, pigra frat',
vin vokas via ŝtat'.
Soldatojn ni bezonas,
ne eblas iu kompat'."

3. Mi marŝas en katenoj
simile al kaptit'.
Batate sub malbenoj,
mi stumblas al milit'.
Ho, Dio, gardu min,
mi ege petas vin!
La sorton mi akceptos,
mi eble kulpas ĝin.

...

4. La reĝo nun decidis,
ke estas do milit'.
Soldatojn oni mortigas
batale sen hezit'.
Militoj voras nin,
rekrutojn kiel min.
Milmiloj devas morti,
sur kampoj sternas sin.

5. Por l' reĝo mi batalos,
ĝis mi ne vivos plu,
ĝis mia korpo falos
en tombon en la fru'.
Jen la soldatofin'!
Ho, Di', kompatu nin!
Tre multaj jam formortis.
Kaj kiam trafos min?

6. Se la kanonoj knalas,
ektremas la aer'.
La kamaradoj falas
kaj sinkas al la ter'.
Ĝemad' el ĉiu flank'
en la soldata rang'
Torentoj ruĝaj fluas.
Ho, vi senkulpa sang'.

...

7. “Adiaŭ nun, familio,
 amik’, doloras tre,
 Mi devas nun, ĉe Dio,
 al nia rezidej’.
 Se restos kampe mi,
 preĝu por mi al Di’.
 Ĉielen Li min prenu,
 animon mian al si.”

8. “Ho, patro kaj gefratoj,
 do jam ne ploru min.
 Mi marŝas kun soldatoj,
 ne eblas ŝanĝi ĝin.
 Regas en tiu sfer’
 nur mon’ kaj malsincer’
 Riĉuloj restas hejme,
 soldatojn kovros ter’.”

*Traduko de la Germana poemo “Soldatenlied” de N. N. 02 en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-134-266 (2005-02-03 11:12:06)

Tiu ĉi germana poemo, kies verkinto estas nekonata, ekestis verŝajne en la 18a jarcento. La unua, kvara kaj oka strofoj troveblas ekzemple en la interreto en “<http://www.molwert.de/Lieder>”. Tie troviĝas ankaŭ la melodio de la kanto, kiun oni povas ekaŭdi tie pere de aŭdio-konektilo, se oni alklakas sur la koncerna ttt-paĝo la suban ŝaltilon.